

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

Gratuloj de alilandaj legantoj

s-ino Zdravka Metz el Kanado

Kara amiko Sibayama

Mi nur povas daŭrigi la gratulojn pro ĉiuj viaj aktivecoj, kursoj, studadoj kiujn vi organizas. Legi pri tio donas ideojn kiel kunigi laboremajn esperantistojn. Certe, apartan gratulon al tiuj kiuj organizas ke la klubo havu civitanan statuson - tiel kutime estas organizataj kluboj en Kanado. Jes, tio postulas al administrantoj iom pli da laboro ĉar la registaro postulas fincan jaran raporton kaj jaran pagon por ke ĝi estu registrita.

Daŭrigu la vojon kaj nur ANTAŬEN! Salutu, mi petas, viajn karajn membrojn.

Aŭdante, fakte legante pri geedzoj DOI kiuj senĉese laboras miaj memoroj revenas al somero 1979

Amike

Zdravka

s-ino Mireille Grosjean (sviso) el Benino

Karaj geamikoj

bv ricevi miajn plej elkorajn gratulojn pro la numero 300 de via organo!!!!

elkore salutas el Kotonuo, Benino

Mirejo

TIEL OKAZIS

Jarkunveno

*jan. 25: Jarkunveno de Jokohama Esperanto-Rondo, en Placo de Kanagawa por Tergloba Civitaneco [Kanagawa Earth Plaza].

El la 65 membroj de la Rondo, 18 ĉeestis kaj kun 33 mandatoj, ĉiuj necesaj aferoj estis fiksitaj, nome: (1) raporto de la agado kaj kaso en 2014, (2) plano de la agado kaj kaso en 2015, ĝis la oficiala fondo de la Ne-Profitcela Organizo "Esperanto Jokohama", (3) rezolucio, ke ni malfondos la nunan rondon, se la NPO estas agnoskita de la urba aŭtoritato,

kaj ke tiam nia bonhavo kaj membreco estos aŭtomate transigitaj al la NPO. Laŭ la nuna plano, la oficiala fondo estos en la fino de la venonta aprilo aŭ la komenco de majo.

NIAJ PLANOJ

*feb. 21: Hama-Ronda Vespero, pri la 100-a Universala Kongreso en Lillo, Francio.

*mar. 7 ĝis 8: Ekspozicio ĉe Foiro de civitanaj agadoj

*mar. 21: Hama-Ronda Vespero

*apr. 18 : Unu-taga kurso por la civitanoj de Jokohamo. Poste oni planas rudimentan kurson 12 fojojn sabate.

■ Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti, Noriko
■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Redaktejo: tamtamo@googlegroups.com ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

97a Legokunsido (daŭrigo)

“Pri homoj kaj verkoj”

Pri eldonoj kaj Szathmari

Sibayama Zyun'iti

El la libro “Pri homoj kaj verkoj” mi prenas nur du eseojn kaj skribas iom pri la temoj tie montritaj.

(1) Eseo de Lena Karpunina, “Ni ne entombigu niajn literaturajn trezorojn”

La eseo prilumas eldonpolitikon de Esperantaj verkaĵoj ĉefe el du punktoj. Unue ke la eldonkvanto estas eta kaj post elĉerpiĝo, malmultaj verkoj estas re-eldonataj, kaj due ke en la tria mondo aŭ socialistaj landoj, eldonaĵoj eŭropaj (kaj evidente ankaŭ japanaj) estas malfacile akireblaj pro kurzodiferenco. Mi bone komprenas precipe la unuan punkton, ĉar mi kelkfoje rilatas al la eldonpolitiko de Japana Esperanto-Instituto. La plej multan preson JEI faris por E-Japana vortaro, nome 3 mil ekzempleroj, do duoble de la membronombro. Sed literaturaj verkoj estas emisiitaj je 400 aŭ 600 ekzempleroj. Tio fariĝas ebla precipe en la kazo, ke la verko estis elektita kiel memorlibro por iu Japana Esperanto-Kongreso kun kelkcent partoprenantoj. La kosto de la eldonaĵo estas inkluzivita en la kongres-kotizo. Iuj verkoj ja elĉerpiĝis, kaj JEI faris duan preson, sed plejofte tiuj ne bone vendiĝas; la ekzemplo estas “Rakontoj de Oogai”, nome antologio de moderna japana literaturisto Mori Oogai. La solvo nur troviĝas en la multeco de esperantistoj kaj japanaj kaj tutmondaj, kio ja estas malfacila.

(2) Eseo de Eva Tofalvi, “La du testamentoj de Sándor Szathmari [ŝandor satmari]”

Mi legis la eseon, ĉar mi aprezas valoron de “Vojaĝo al Kazohinio” kaj “Maŝinmondo” de Szathmari. En Kazohinio, la valorkoncepto de la (almenaŭ de mi konata) homaro estas inversita, ke ekzemple “manĝado” estas io hontinda kaj

kaŝinda afero. La rakonto estas el la fluo de Gulivero. Mi iam legis recenzon, ke iuj epizodoj en Kazohinio havis fonton en siatempa aŭ antaŭtempa Hungario, sed mi tute ne scias tion kaj pure aprezis ĝin kiel (mal)utopian rakonton en mia juneco kiel esperantisto.

Sed antaŭ ol esperantistiĝi, mi legis (en la japana) “Utopion” de Thomas More, kaj “1984” de George Orwell, do estis nature senti al mi, ke Kazohinio estas 1984-eska, sed tiu ĉi eseo ja atentigis, ke Kazohinio antaŭiris 1984. Orwell povus esti nomata posteulo de Szathmari; sed tio ne okazis, ĉar kaj Esperanto kaj la hungara estis malpli konataj lingvoj.

En la eseo estis interesa la epizodo pri la tetraedra monumento, testamentita de Szathmari mem. Ĝi efektiviĝis dank’ al la socia liberiĝo de Hungario, kaj tio impresis min.

Je kio la esperanto-literaturo ĉarmas min?

TANIGAWA Hiroshi

Al mi tre malfacilis sufiĉe bone kompreni aŭ profunde gustumi la diversajn argumentaĵojn entenatajn en ĉi tiu esearo. Sed mi diversloke trovis priskribojn freŝe kaj kontentige impresdonajn (kvankam nelegitaj restis 5 el 11 ĉapitroj). Jen, iomete el miaj impresoj;

HUMPHREY TONKIN enkonduke skribis (“Literaturo kaj interliteraturo”)

“Auld kaj Waringhien vidis en Esperanto unikan eblecon aliri la komparan literaturon, ĉar la literaturo de Esperanto estas iasence mikspoto de la influoj de multaj naciaj literaturoj, kaj sekve, interalie, trafluejo de multaj impulsoj naciaj...”

“La Esperanto-literaturo, kaptita inter la fortoj de la naciaj literaturoj, pene konstruas

al si (kaj al la Esperanto-komunumo) ankaŭ sendependan, aŭ vole sendependan, kulturon.... Sed tiu kreo de sendependa kulturo, same kiel Zamenhof kreis sendependan lingvon, estas dependa (paradokse) je la kulturoj, kiuj antaŭis ĝin.”

Mi pensadis de antaŭe, ke japanaj esperantistoj verkas esperantolingve surbaze de la japana kulturo. El la riĉa fekundeco de la japana kulturo kreiĝas nova, freŝa esperantolingva literaturo, en kiun enfluis konscie aŭ nekonscie la esenco de la japana kulturo.

Tia fenomeno okazas ankaŭ ĉe la alinaciaj esperanto-literaturoj. Sendube, la esperanto-literaturo estas, kiel Tonkin skribis, “mikspoto de la influoj de multaj naciaj literaturoj”.

Akordige elprenante el diversaj naciaj literaturoj iliajn ellaboritajn esencojn, la esperanto-literaturo kreiĝis kiel propre esperanteca, unike universaleca kulturo, mi pensas. Tia eco de esperanta literaturo ĉarmas min, mi pensas.

KRYS UNGAR prezentas la ĉarmon de Marie Hankel (1844~1929);

“Marie vivis en tempo, kiu estis tempesta por Esperanto (la IDO-skismo, la morto de la fondinto kaj dissplitiĝo de la jaroj 1914~1918”

“Ŝiaj priesperantaj verkoj abundas je religiaj entuziasmo kaj simbolo..., sed ne mankis humoro.”

“Ŝi estis virino kun la pura infana animo, kiu tamen por Esperanto povis esti vire energia kaj plena de sankta fervoro. Ŝi estis ‘idealista kaj meditema, vere homa, de ĉiuj amata kaj sekvata’ (Bleier kaj Cense).”

“Siajn lastajn 25 jarojn ŝi dediĉis al Esperanto, kiel ‘la plej fidela amikino de la Majstro’ (Cart), Ungar skribis ankaŭ, ke Marie Hankel kontraŭstaris ĉiujn reformojn proze kaj verse, kaj ke ŝi kontraŭstaris la enkondukon de neologismoj, ĉar gravis al ŝi, ke Esperanto restu facila kaj ĝenerale uzebla.

Rilate la enkondukon de la neologismoj, mi iom alie opinias. Ĉiam nova enkonduko de neologismoj ne eviteble necesas (kvankam pleje skrupule) enfluigi la ellaboritan esencon de diversnaciaj literaturoj, mi pensas.

Ĉiuokaze tamen, mi sentas elkoran simpatian kaj estimon al Marie Hankel. Estas certe ke ŝi kaj multaj aliaj ‘ŝi-j’ tramatadis esperantan literaturon. Kaj do por danki ilin, al mi necesas antaŭ ĉio, pli multe ilin legi ... certe!



Tezoj/eseoj pri Eroŝenko varbataj!

Okaze de la 125 jarojn de la naskiĝo de Vasilij Eroŝenko, Projekto Eroŝenko 125 varbas tezojn aŭ esojn pri li, ĝis la fino de aprilo. Ni planas eldoni libron (aŭ almenaŭ retpaĝaron) pri tio, selektante el la varbaĵoj. La temo povas esti ne nur pri li mem, sed ankaŭ pri personoj aŭ sociaj kondiĉoj ĉirkaŭ li. En Esperanto, tezo originala estu el 6000 ĝis 24000 literoj plus resumo, eseo estu ĝis 6000 literoj. Aparta regulo estas por japanlingvaĵoj. La verkon (kaj eventualajn demandojn) al la Esea Grupo de Eroŝenko 125, ĉe rederosxenko125@googlegroups.com.

(Rimarko de la redaktoro: En tiu ĉi numero ne aperas parto de la biografio de Eroŝenko fare de s-ino Tatyana Auderskaya, pro spacomanko.)

Ĉiuj rajtas vivi (Agado pri la Vivo kaj Rajto)

Doi Ĉieko

En 1975 fondiĝis la “**Societo de la Gepatroj de Infanoj kun Denaskaj Handikapoj**”^{*1}.

Temas pri “elekto de la vivo”: pri diversaj problemoj de abortigo al handikapaj **embrioj-fetoj**^{*2} kaj ekzameno antaŭ naskiĝo. Alia temo estas forigo de diskriminacioj kaj stabiligo de rajtoj.

En 2009, ĝi eldonis broŝuron, laŭ kiu mi skribas ĉi tiun artikolon.

La problemoj pri “**Vivo kaj domineco**”^{*3} kaj pri “**Rajto kaj diskriminacio**” ekzistis de la antikveco, kaj nuntempe ili estas fokusitaj sub la nova aspekto. Por homoj kun tiaj problemoj la aferoj estas realaj kaj radikaj. La grupo volas informi la aferojn por pliprofundi la gravecon de la problemo.

En 1948 en Japanio oni komencis apliki la leĝon por “preventi naskiĝon de nebonaj idoj laŭ la eŭgenika vidpunkto kaj samtempe protekti la vivon kaj sanon de la patrinoj”. “**Eŭgeniko**”^{*4} estas “scienco pri la plej bonaj kondiĉoj de reproduktado ĉe la homoj” (laŭ Nova PIV). Do, tio celis plibonigi genetikecon, forigi malbonajn kaj prizorgi nur bonajn ecojn.

Siatempo en Japanio, tri jarojn post la militfino, naskiĝis multaj beboj. Ili kreskis en malriĉeco postmilita kaj oni nomis ilin “**la generacio amasa**”^{*5}. Tiam okazis multaj abortigoj senkonsideraj pri eŭgenikismo.

En la leĝo estas statuto pri eŭgenika operacio, kaj en la tabelo viciĝis simptomoj rilataj al tio. Eblis abortigoj sen la konsento de la naskonto. Ĝis 1996 okazis 18 072 da tiaj abortigoj laŭ la oficiala statistiko. Post la efektivigo de la leĝo ne estiĝis krimo de kontraŭleĝa abortigo.

En 1972 prezentiĝis projekto ŝanĝi parton de la leĝo pri la eŭgenika operacio. Antaŭe la leĝo celis senigi kontraŭleĝan abortigon pro malriĉeco, kaj oni volis aldoni novajn kondiĉojn: unu el ili celis konservi mensan kaj fizikan staton de la naskonto: ebligi abortigon pro ia handikapo de la naskoto.

Dume daŭris ŝanĝoj de leĝoj koncerne la temon. En “**Blankaj Libroj pri Publika Bono**”^{*6} en 1974 estas skribite: “Pri la problemo de homaj riĉfontoj ni devas konsideri ambaŭflanke: plibonigo de preferindaj riĉfontoj kaj elimino de nepreferindaj. Konsiderinte tion ni bezonas ĝenerale antaŭenigi la aferon”. Do laŭ tio homoj devas esti nur riĉfonto.

En 1996 “**La leĝo pri la eŭgenia protekto**”^{*7} estis parte reviziita kaj ĝi fariĝis “**La leĝo pri protektado de la patrineco**”^{*8}. La ŝanĝo de la leĝo okazis sub la influo de internacia movado pri protektado de la patrineco, kaj kritiko pri la leĝo de eŭgenikeco.

Ĉu nuntempe jam ne estas elekto laŭ eŭgenikeco? Ja, tio ankoraŭ restas. Medicino progresis, kaj laŭ **ekzameno frua antaŭ nasko**^{*9} ni povas ekscii pri ecoj de naskotoj. Pro tio gepatroj povas elekti, ĉu naski aŭ abortigi.

Ĉu oni povas elekti vivon laŭ eŭgeniko?

“Societo de la Gepatroj de Infanoj kun Denaskaj Handikapoj” eldonas bultenon por informi al la societanoj pri diversaj problemoj. La societo ankaŭ prezentas demandojn al koncernaj instancoj kaj grupoj. En la societo estas fako pri “la vivo kaj rajto”, kies reprezentanto iam lernis Esperanton en nia grupo, kaj do de tiu, mi ricevis la supre menciitan libron.

*1 先天性四肢障害児父母の会 / *2 胎児 / *3 いのちと優生 / *4 優生学 / *5 団塊の世代 / *6 厚生白書 / *7 優生保護法 / *8 母体保護法 / *9 出生前診断



Niaj Klasoj kaj Kursoj

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

*Regulaj Klasoj en sabato: (1) Meza klaso gvidata de Doi Ĉieko; oni lernas per “Mirindaj Aventuroj de Metilernanto Hlapiĉ” / (2) Klaso por legado de “Hispana, Kataluna, Mangada...” gvidata de Doi Hirokaz / (3) Jokohama Salono. 2 fojojn oni legas el libro “Vizaĝoj”, 1 fojon frazfarado kaj alian fojon tradukado.

*Regulaj Klasoj gvidataj de Doi Ĉieko en merkredo: (1) Oni legas “Kie boacoj vagadas” de Eija Salovaara. / (2) Daŭriga kurso, per la posta parto de “Hanako lernas Esperanton”.